

## KIE ESTAS DIO DUM SUFERADO DE HOMOJ?

*Demando de suferado okupas homojn jam de longe, precipe hodiaŭ, kiam ĝojo kaj volupto iĝis vivprincipo. Kaj homo staras antaŭ penso: Kiel povas amanta Dio permesi tiom da mizero? Jen kelkaj konsideroj al tiu ĉi brulema temo.*

Literatura mondo festas nunjare (2015) 200 jarojn ekde morto de Matthias Claudius, unu el la plej kompleza poeto. Kial tiu ĉi poeto – ankaŭ kiel homo – ĝuas ankoraŭ nuntempe tian favoron? Ĉar li konservis al si spite de ĉiuj malfacilaĵoj kaj tragikeco dum la tuta vivo ĝojon el kredo kaj infanece ĝojan koron.

Li kaj lia edzino Rebeka devis al mor- to redoni kvar siajn infanojn. Kiam mortis etulo Matthias, deklaris pli poste tiu poeto: „Longe mi opiniis, ke mia kredo estas firma. Sed tuihore, kiam mi metis mian Matthias en ĉerkon, nur malfacile mi tenis sindonemon kaj humilon. Mia kredo estis forte pruvata. Nur tiam mi spertis, kion signifas la vivo de la homo surtere. Kio estis antaŭe, tio estis nur infana ludo!“

Matthias Claudius spertis ĝisfunden tiun senkompatan „Kial?“ vid-al-vide al „sensenca suferado“, kiel ni tion plej ofte nomas. Kiu vidas proprajn infanojn suferi kaj morti, trairas tra plej furioza fajro de la tento. Matthias Claudius trairis ĝin kaj eliris el ĝi purigita kun pli granda lumo kaj pli granda kredo. Kun tia kredo, kun tia interna klara paska ĝojo, sinfordonemo, konsola kaj konsolanta, kiu tiom elradiiĝas el liaj poemoj kaj el lia vivo. Ĝi derivas de la bildo de la Savinto, kiun Li portadis profunde en la koro. Tial li foje skribis al sia amiko: „Kiu volas kredi je Kristo, tiu devas scii, kiel konsiliĝi sen Li.“

Multaj homoj rompiĝas ĉe grava suferado, kiun ili travivas ĉe aliuloj aŭ ĝin spertas sur si mem, antaŭ ĉio dum turmentado fare de diablo. Ne senkaŭze la suferado en kreitaro estas nomata kiel „roko de ateismo“, ĉar multaj sur ĝi kraŝas.

Tenebre kaj malfacile kiel grupo de kaptitoj trairas la mondon lamento kaj akuzo: Kiel povas ekzisti Dio, ĉiopotenca Kreinto de tiu ĉi mondo, nomata Patro, se Li lasas

siajn homojn tiel kruele suferi? Ĝuste suferado de senkulpaj infanoj (Dostojevskij) fariĝas plej akra akuzo kontraŭ Dio kaj ĝi priŝtelis multajn homojn pri ilia kredo kaj racio.

Sed – kaj tio estas ankaŭ vero: Tia suferado jam multajn homojn ankaŭ eltiris el letargio kaj burĝeca komforteco kaj alkondukis ilin al tio, ke ili malfermu koron al la suferanta mondo. Tiel ekzemple gravan viron de la proksimula amo, Friederich Bodelschwing, kiu kiel patro vidis suferi siajn kvar infanojn kaj kiu ilin perdis dum du monatoj pro malsano de difterio. En retro-rigardo li foje diris: „Nur tiam mi vidis, kiel kruda povas esti Dio koncerne homojn, kaj tial mi iĝis mizerikorda al la aliuloj.“ Kaj pri multaj aliaj eminentaj personuloj mi povus simile rakonti. Ankaŭ gigantan progreson de medicino oni ne povas ekspliki sen profunda konsterno pro la suferado en la mondo. La demando, kial ekzistas en la kreitaro tiom da nemerita suferado, kial enĉiela Patro lasas tiom suferi tiel multajn siajn infanojn kaj ĉe tio Li ankoraŭ silentas – tiu demando estas malnova kiel mem la homaro. Kaj librojn, kiuj tion priskribis, enprenus neniu biblioteko. Ekzistas al tio senfine multaj respondoj, sed neniu nin trankviligas. Neniu fakte helpos, por ke ni la vivon pli bone toleru, se nin vizitas longe daŭranta sufero aŭ se ni devas ĝin rigardi ĉe aliuloj.

Iu virino, kiu devis tvavivi plej gravajn fazojn de deprimiĝo, foje rakontis al mi, kiel ŝi decidiĝadis finiĝi sian vivon. Antaŭ tio ŝi ankoraŭ eniris preĝejon. Tie pendis granda kruco, sub kiun ŝi stariĝis. Ŝi ekrigardis Kriston kaj diris: „Mi ne plu povas tion elteni. Ne plu tio eblas. Pardonu al mi, ke mi tion nun devas fari.“

Tiumomente en ŝia interno heliĝis, ŝi ek-sentis varman lumon, el kiu ŝin alparolis iu

voĉo: „Jen infano, kion mi faris, kiam estis al mi destinita tio la plej malbona?“ Ekde tiu momento ŝi ekhavis tute alian sintenon al sia malfacila anima malsano. De tiu tempo ŝi estis liberigita de tia tento.

Tiel aspektas vorto en silentado de Dio kaj respondo al malfacila suferado. Tiun enhavas neniu libro, eĉ ne libro de Job. Ĝi estis pendigita en vivgrandeco sur la kruco. Kaj ĝi eniras en la homan deprimitan estulon pere de la mondo kaj serĉas eniron en ĉiujn domojn, kie estas sufero. Tio estis ankaŭ respondo de la Papo Francisko, kiam li staris antaŭ tre forte suferata popolo en Filipinoj post granda naturkatastrofo: „Multaj el vi sin mem demandis kun rigardo fiksita al Kristo (krucumita): »Kial, Sinjoro?« Kaj al ĉiu el vi la Sinjoro el sia koro respondas. Mi havas nenion plian, por diri al vi. Ni rigardu Kriston: Li estas Sinjoro, Li komprenas nin, ĉar Li trairis ĉiujn provojn, kiuj sur nin falas... Pardonu, ke mi ne havas aliajn vortojn.“ (homilio de la Papo Francisko en la meso en Tacloban, Filipinoj 17.1.2015) Ekzistas do nenia alia respondo. „Mi estas vorto de la amo de la patra koro,“ diris foje la Sinjoro al Henriko Seuse. Kaj pere de tiu ĉi „Vorto de la amo“ parolis Patro: „Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata; aŭskultu lin!“ (Mar 9,7) Lin ni devas aŭskulti! Al Li ni devas rigardi! „Kiam ni pensas pri nia suferado, ni devas konsciiĝi kaj ekkoni, ke estas Dio, kiu tie ĉi suferas.“ (s-ta Juliana el Norwich)

Neniam povas esti sufero en kreitaĵaro traigita kaj klarigita per homaj pensoj. Ni devas ŝirmi nin kontraŭ tio, ke ni parolu senpripense pri silentado de Dio rilate al la sufero, kiam la Patro en mizeraspekto de sia Filo al ni parolas, „kun ni ploras kaj iras kun ni“ (Papo Francisko).

La tuta vivo estas tro profunden radikigita en Dia mistero de la kreitaro, ol ke ĝi estu eksplikebla. Tial povas la sufero esti akceptata nur per rigardo al Jesuo, kiu ĝin libervole kaj konscie surprenis, en ĉiu ĝia hororeco. Kiu la suferon akceptos kun pacienco, tiel kiel memevidente akceptas ĝojon, amon, dolĉan

frukton, sanon, ĝuon, iun fojon li estos pri-donacita per ekkono, „ke fakte tio estas Mi (Kristo), kiu ĉion, kion vi suferas, mem suferas.“ (s-ta Mechtilda el Hackeborn)

Ni ne estas kompetentaj, ni homoj (kaj tute ne la kristanoj), ke ni akceptadu nur belan, ĝueman, ĝojan, amuzan flankon de la vivo. Tia opinio malkaŝas krom tio supraĵan opinion pri ĉiuj niaj suferantaj gefratoj, kiuj nun estas solecaj, plorantaj, suferantaj pro malsato, lamentantaj mortantaj. „Evitu homojn, kiuj penegas pri distriĝo, por ke ili sin iel tenadu rektaj!“ (Matthias Claudius)

Tio estas granda tento de nia tempo. Sed ĉe tio ni englitas ĉiam pli profunden en maron de malĝojo. La vivo tedas nin. Kaj benoj de la sufero estas al ni rifuzataj, kiel tion travivis granda viro kaj edukisto Johann Heinrich Pestalozzi, kiu pri si diris: „Sufero de mia vivo havis por mi pli grandan valoron, ol povis al mi doni ĝuo de mia vivo. La sufero de mia vivo ebligis en mi maturiĝon, kio aliel en mi neniam maturiĝus, se mi estus feliĉa.“

Tiu ĉi paska kredo malaperas en nia okcidenta mondo per konsterniga maniero. Ni nur ekpensu pri helpado al memmortigo, pri eŭtanazio. Lumo de la espero malaperas al ni, „ekigās nokto kaj ankoraŭ pli ol nokto“. (Nietzsche) Dependas de ni, „dum estas ankoraŭ hodiaŭ!“ , por ke ni tiun kredon nove ekkomprenu kaj profundigu, se ni ne volas, ke ni iun tagon – kiam nin atakos grava sufero aŭ nin tuŝos morto – etendu la manon en malplenecon, aŭ falu en malplenecon. „Kiu ne volas ekkredi je Kristo, tiu devas scii, kiel povi sen Li helpi sin.“

Tial venas al tiuj, kiuj ankoraŭ povas kredi, jena insista petego: „Per via spirito vi devas kuraĝe ĉirkaŭbraki la tutan teron en ĝia larĝeco kaj malproksimeco, eĉ ne unu animon sur la tero eliminu el la preĝo. Eĉ al neprudentaj, suferantaj kreitaĵoj vi devas fari homan kompaton kaj rekomendi ilin al boneco de Dio“ (Jesuo al Maria Bernarda, Prenu kaj skribu!, Notoj el taglibro) ■

*Urs Keusch (El Vision 2000 – 2/2015)*